

Friedrich Rückert,

Tro grandas tiu mondo ĉi

tradukita de Manfredo Ratislavo

Tro grandas tiu mondo ĉi ²
por preni ĝin alkore;
ke povas tion ja nur Di',
konfesu ni adore;
tro eta estas homa kor'
por ame sin dediĉi for.

Vi devas al fidela sin'
vin alklinadi verve,
al tiu alproprigi vin
tutkore, senrezerve.
Amante kore tiun ĉi
la tutan mondon amos vi.

*Traduko de la Germana poemo "Die ganze Welt ist viel zu groß" de FRIEDRICH RÜCKERT (*1788 – †1866) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1993.*

MR-258-1a / Arg-61-119 (2003-10-26 00:39:11)

²aŭ: Tro granda estas mondo ĉi